
DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 3 (912) • 2015 •

korektita



# Ĉi-jare antaŭ –

600 jaroj **Magistro Jan Hus, estis murdita**

100 jaroj **okazis la Armena Genocido**

70 jaroj **Dietrich Bonhoeffer estis murdita**

70 jaroj **la Dua Mondmilito finiĝis**

10 jaroj **Roger Schutz, Taize, estis murdita**

**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
🖂 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021; 💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Pavel POLNICKÝ;
🖂 Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
✆ +420311241406;
💻 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto**: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS
🖂 Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
✆ +36 302 000 306;
💻 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. • Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP; IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
🖂 Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
✆ +46 70 2004574; 💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ
Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Al Dia regno oni devas scii: ludi! | 51 |
| Meditado | 53 |
| Timu Dion kaj fidu Kriston! | 55 |
| Kuraĝo fronte al ISIS | 56 |
| Alvenis letero/bulteno | 59 |
| La Armena Genocido | 60 |
| Bonhoeffer estis murdita | 61 |
| Jan Hus estis murdita | 62 |
| Roger Schutz estis murdita | 63 |
| La mondo burĝonanata, somero | 64 |
| Tagordo por la jarkunveno | 65 |
| Financaj raportoj | 66 |
| Informetoj | 70 |
| Rememore pri Jenő Zágoni | 71 |
| Haleluja | 72 |

## Redaktoraj vortoj

Baldaŭ okazos la ekumena kongreso, inter alie kun la (sub)temo “La malsameco pliriĉigas min”. Kion tio signifas por mi – konkrete? Por ke la malsameco riĉigu min, mi devas emi lerni de tiu diferenco, kuraĝi alproksimiĝon al la alia persono aŭ ideo aŭ kredo. Supozeble ekzistas limo pri la grado da malsameco, por ke mi pripensu alproksimiĝon. Kaj se tiu diferenco estas tro granda, estas risko ke timo regas min kaj mi distancigas min for de la alia. Eblas praktiki, eblas grandigi sian komfortan zonon, eblas lerni akcepti pli kaj pli grandan malsamecon. Mi esperas ke la ekumena kongreso donos al la kongresanoj la eblecon “brakumi” la malsamecon inter ni kaj tiel riĉiĝi.

Simile mi esperas ke la riĉa kaj varia enhavo de Dia Regno riĉigas vin. Mi esperas al vi bonan legadon.

# Al Dia regno oni devas scii: ludi!

Julia Sigmond, IT/RO

Por atingi, ke la homo estu iomete pli feliĉa dum la surtera vivo, oni devas scii ludi. Sed por scipovi ludi ankaŭ plenkreske, oni devas lerni jam en la infanaĝo, fakte kion signifas la ludo.

La infanoj kun bonŝanca karaktero naskiĝas jam kun ludemo. Oni povas konstati, ke la infanoj – ankaŭ koncerne de ludemo – estas tre malsimilaj. Tamen, la plimulto – bonŝance – instinkte ek-ludas. Bedaŭrinde, tamen estas infanoj – bonŝance malmultaj – kiujn oni devas instrui ludi.

Estas stranga kaj kurioza fenomeno vidi infanon enuiĝantan. Ĝi aperas precipe ĉe la unuinfanaj familioj, kie la infano kreskiĝanta sen gefratoj povas anime vundiĝi eĉ por la tuta vivo. Certe, ĉe la 3-4 aŭ plurinfana familio, tiu ĉi problemo ne ekzistas, ĉar tie neniam mankas la ludkolegoj. Kiu ankoraŭ ne scias, tiu eble ne kredas, ĉar eĉ imagi ne kapablas, ke la ludo verdire estas **morte serioza** afero.

Kion oni ne povas atingi ĉe infanoj per kvereloj aŭ hurlado, per konstanta punado aŭ ĉe multaj lokoj per batado, tion multe pli facile oni povas efektivigi per ekzemplodono kaj ludo.

## Ridetante kaj kantante

Ĉiam ni havu sufiĉan tempon por la ludo! Niaj infanoj pleje bezonas ĝin, ke ili povu senti la egalrangecon. Kaj se niaj infanoj lernas, ke la ludoj havas regulojn, tiam – ludante – ili lernas ankaŭ la regulojn de la vivo. Nome, ekzemple kiel en la ludo oni ne rajtas trompi, tiel ankaŭ en la vivo oni devas honeste *ludi* t.e. vivi!

Unu el la plej bonegaj ludoj estas la fabelrakontado. Certe estas bonega ankaŭ la legado el fabellibro (anstataŭ rigardi la televidon), ĉar tiel la infanoj alkutimiĝas kaj eble ekamas la legadon mem.

Apude estas unuaranga ludo (ankaŭ por la plenkreskuloj) la komuna fabelrakontado. Eblas ludi ĝin duope, sed se pluraj personoj partoprenas la ludon (kaj plenkreskuloj kaj infanoj), eksterordinaraj historioj povas naskiĝi.

Sankta Marko 10,13-16

13 Kaj oni venigis al li infanojn, por ke li tuŝu ilin; kaj la disĉiploj admonis ilin.
14 Sed Jesuo, vidinte tion, indignis, kaj diris al ili: Lasu la infanojn veni al mi;
ne malhelpu ilin, ĉar el tiaj estas la regno de Dio. 15 Vere mi diras al vi: Kiu ne
akceptos la regnon de Dio kiel infano, tiu neniel eniros en ĝin. 16 Kaj li prenis
ilin en siaj brakoj, kaj benis ilin, metinte la manojn sur ilin.

Neniam bedaŭru la tempon uzitan por ludi!

Volu kredi, ke ĝi ne estas perdita tempo, sed eble iu fantasta profito, ĉar fojfoje ni ekscias aferojn pri nia infano – pri kiuj eble eĉ li mem ne scias -, sed dum la ludo el la subkonscio prezentiĝas, kaŝitaj timoj aŭ malnova sekreta sopiro. Antaŭ longe mi legis en novelo de Gèza Gàrdonyi, ke tiu estas la bona instruisto, kiu matene tion diras al sia klaso: INFANOJ! NI LUDU LERNEJON!

Mi konis ĵurnalistajn geedzojn. Ili havis du gefilojn. La gepatroj neniam havis tempon ludi kun ili kaj neniam rakontis al ili fabelojn. Ĉiusabate posttagmeze la du infanoj devis denombri, kiujn malbonaĵojn ili faris dum la semajno. La patro severe aŭskultis ilin. Poste ili eniris en la banĉambron, la infanoj malvestiĝis, la patro elprenis la skurĝon, ili kliniĝis sur la bankuvon kaj atendis sur la nudan postaĵeton la frapojn meritajn pro iliaj kulpoj.

La patro mem rakontis sian eduk-metodon por amika societo. Sekvis arda disputo, sed neniu sukcesis konvinki lin, ke tiu metodo estas erara. Mi ne scias kio okazis al tiuj infanoj, kiaj plenkreskuloj ili iĝis.

Mia amikino rakontis al mi pri sia plej granda ĝojo. Ŝi havas multajn genepojn, al kiuj ŝi ofte rakontis fabelojn. Ŝi malsaniĝis. Sentante, ke ŝi alproksimiĝas al la fino de la vivo, ŝi invitis la genepojn, por donaci al ili iun memoraĵon. Kiam alvenis la plej juna nepo, ankaŭ lin ŝi demandis:

- Kion mi donacu al ci, mia Etulo?

La plej juna nepo tiel respondis:

- Avinjo, ĉu mi povus rakonti al ci fabelon?

ଔ


El *Preĝo por ĉiu Tago*
de Jelly Koopmans-Schotanus

**17. junio**

Ho kara Sinjoro, montru al mi miajn kaŝitajn mankojn. Liberigu min de miaj malbonaj pensoj, sopiroj kaj agoj. Mi estu sincera je mi mem, je Vi kaj je miaj geamikoj.




Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 50).
Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.

# Meditado

dum la ekumena kongreso en Trento,
22-an de aŭgusto 2014

Éva Farkas-Tatár, HU

Kore mi salutas vin ĉiujn, mi ĝojas ke ni povis pasigi tiujn tagojn kune. Mi esperas, ke vi kunportos iun memoraĵon ankaŭ en via animo, ne nur en via kofro iun donacon por la hejmanoj, io ankaŭ en via koro restas el ĉi tiuj tagoj.

Karaj gefratoj, en niaj kristanaj konferencoj ofte okazis tiel jam de mia junaĝo, ke la lastan tagon ni kolektis panerojn. Eble vi konas tiun esprimon el kristanaj renkontiĝoj, kiam ĉiu povis mencii ion, kio dum la semajno estis speciale valora, kio restis en la memoro, kio tuŝis la koron, do tio estis la kolektado de la paneroj.

En la predikoj de mia edzo ofte estis iu rakonto kelkfoje el aliaj mondopartoj. Li aŭdis iun interesan fabelon kaj tion li citis. Tia estas ĉi tiu saĝeco el Nov-Gineo kiun mi rakontos al vi. Iu vilaĝano devis hejmeniri vespere, sed li sciis, ke estas vojeto tien, do li ekiris. Kaj kiam li estis en arbaro subite jam estis tiel densa mallumo ke li apenaŭ povis orientiĝi. Sur la vojeto li tamen faris la sekvan paŝon kaj tiam subite antaŭ li estis iu granda roko, tiel ke li ne plu povis iri, kaj ne vidis la sekvan paŝeton. Tiam li komencis tiel preĝi: “Sinjoro bonvolu skui iom la teron ke tiu roko malaperu ĉi tie.” Kompreneble nenio okazis, aŭ io okazis, sed ne tertremo. Flankeniris la nuboj kaj aperis la luno, fariĝis luma denove la arbaro kaj li ekvidis, ke la vojeto tuj apud la roko daŭras plu kaj li povas daŭrigi la vojon tie. Mi pensas, ke vi mem jam povas trovi, kio estis la instruo en tiu ĉi fabelo. Ofte inter la malfacilaĵoj ni atendas iun videblan miraklon. Eĉ ni devas konfesi, ke ni estus feliĉaj, se ni havus tiajn vidindajn miraklojn, per kiuj ni povus iom ankaŭ fanfaroni: en niaj rondoj okazas mirakloj, miraklaj resaniĝoj, aŭ io ajn. Sed la Sinjoro tiel delikate volas nin gvidi, ke ne grandaj mirakloj okazas ĉirkaŭ ni, sed en nia koro fariĝas lumo.

Mi volas ion diri pri tiu ĉi lumo, kiu ekestas en ni. En iu epistolo Sankta Paŭlo skribas, ke Dio estas kiu estigis lumon, lumon de scio en nia koro. Dio estigis la lumon por lumigi la vizaĝon de Kristo. Do havas celon tiu lumo, kaj tio estas la celo. Mia edzo rememoris pri iu vizito en Romo en la katakomboj, kie kun malgranda grupo li iris. Iu frato gvidis ilin, kaj en lia mano estis kandelo, kiu lumigis la vojon. Kiam ili atingis iun belan pentraĵon sur la muro, la frato haltis tie kaj komencis paroli pri tiu bildo kaj per la alia mano kaŝis tiel la lumon, ke tiu ne lin faru pli videbla, sed ke la lumo montru la vizaĝon de Kristo tie. Estis granda admono ankaŭ por ni tiu ĉi, mi pensas ke inter vi, mi ne bezonas tro multe klarigi tion ĉar ankaŭ vi komprenas la signifon. Ne ni produktis

tiun lumon, kiu estas en ni, sed Dio estigis la lumon. Ankaŭ la lumon de scio. Dio estigis tion, sed li havis celon. Ne tio estas la celo, ke ni estu pli bone videblaj, kiel grandaj, kiel saĝaj, kiel seriozaj kristanoj ni estas, sed tiu interna lumo, kiun ni ricevis, havas tiun celon ke ni iom kaŝu nin mem, kaj ni montru pli klare, pli videble la vizaĝon de nia Sinjoro Jesuo Kristo per tiu ĉi lumo.

Vi scias certe ke nuntempe ankaŭ krom la ekleziaj instruantoj ekestas ĉiam pli multaj animzorgantoj sur diversaj spiritaj fundamentoj. Inter ili ekestis fakesprimoj kaj kelkfoje tro severaj kristanoj eĉ tiujn esprimojn jam forigas, ĉar ili apartenas al tiuj rondoj, do ni ne uzu ilin. Mi ofte miris, ke la vorton *meditado* oni jam transdonis al tiuj grupoj, do tiun vorton ne diras severaj kristanoj.

Ni ne faru tion, ankaŭ niaj sanktuloj meditadis, do tiu estas ankaŭ nia esprimo. Lerni kaj praktiki tion kiel ni povas en silento atendi kaj kompreni nian Sinjoron, tio estas nia afero.

Tia estas ekzemple ankaŭ la esprimo ke vi pensadu pozitive. La pozitiva pensado apartenas al la konsiloj de la animzorgantoj. Kaj nun mi ŝatus montri al vi, kiel malnova estas tiu konsilo, kaj ke ne la nunaj psikologoj tion inventis. Aŭskultu, kion skribas Sankta Paŭlo al la filipianoj en la 4a ĉapitro, en la oka kaj naŭa versoj: "*Fine fratoj kio ajn estas vera, kio ajn honesta, kio ajn justa, kio ajn ĉasta, kio ajn ŝatinda, kio ajn bonfama, se estas ia virto, se estas ia laŭdo, tion pripensu. Kion vi lernis kaj ricevis kaj aŭdis kaj vidis en mi, tion faru kaj la Dio de paco estos kun vi.*" Do li konsilis tion jam antaŭ preskaŭ dumil jaroj, ke ni ne pensadu pri la malbonaj novaĵoj. Ni aŭdas tiom multe en la televizio, en la radio, en la gazetoj – estas tiom da malbelaj, malhonestaj, abomenindaj novaĵoj ke ili povas veneni nian pensadon. Do li tion konsilas ke pri la bonaj, belaj, ŝatindaj aferoj ni pensadu kaj ni povas tiel daŭrigi, se ni pensadas pri tiaj aferoj, ni ankaŭ parolos pri tiaj aferoj.

Ankaŭ mi mem ne transdonu la malbonajn, malbelajn, abomenindajn diraĵojn, novaĵojn. Kiom eble plej multe mi pensu pri tio, ke kion mi diras, tio estu konsolo, tio estu afabla, por ke estu agrable esti apud mi. Tion mi nur flanke diras nun, ke ni maljuniĝas, ne nur mi, ankaŭ vi sekvos min. Mia edzo havis tiun preĝon, ke: "*Sinjoro, gardu min, ke mi, eĉ se mi maljuniĝas, restu ankoraŭ aminda. Inda je amo. Oni ne foriru el mia proksimeco ĉar mi estas malfacile tolerebla, ĉar mi komencas tuj plendi, ĉar mi havas ĉiam iun kritikon pri la gejunuloj, mi ĉion povus fari pli bone ol la aliaj ktp.*" Do pensu pri tio, ke estu agrable esti kun ni, apud ni. Ke la homoj estu kontentaj, se mi estas en iu societo kaj ne rifuĝu. Tiel estas absolute moderna konsilo, ke ni pensu ĉiam pri belaj kaj bonaj aferoj. Tio estas pozitive pensadi.

Ni havis ĉi tie agrablajn tagojn, okazojn por lernado, interamikiĝo kaj ankaŭ por silento. Ankaŭ hejme ni klopodu resti kelkfoje en tia silento por ke la Sinjoro povu tuŝi nin. Ni havas tiun promeson, ke Li ekparolos. Do fidu en tio, ke Li estas preta donaci la Sanktan Spiriton, al tiu kiu tion petas de Li.

Havu benitan ripozigan nokton!

# Timu Dion kaj fidu Kriston!

## Persona impreso post la Bibliaj Tagoj

LÁSZLO Maria, RO

Danko al nia ĉiela Patro pro tiuj benataj kaj animriĉaj tagoj, kiujn ni partoprenantoj el diversaj landoj ĝuis dum la Bibliaj Tagoj en bela Vroclavo. Kvazaŭ amika nevidebla fadeno ligis la diverskonfesiajn esperantistojn. La temo estis la Apokalipso (REVELACIO de la apostolo Johano.), la lasta libro de la Biblio.

Multaj homoj vidante la hodiaŭajn terurajn eventojn, konfliktojn kaj malamon ĉie en la mondo timas kaj maltrankvile eĉ komencis kalkuli la tempon. Ŝajnas ke la prirabita, pro pli granda profito, tero nuntempe revenĝas sin, la tera vivo pereos.

Kio okazos kaj kion fari do?

En la ĉapitroj de Apokalipso ni trovas la respondon. Jes okazos multaj neimageblaj katastrofoj, suferadoj, diversaj malbonoj, ĉiuj pli grandaj ol ĝis nun ĉar la indulga tempo de Dio havos finon. Tamen en tiuj versikloj ni povus legi ankaŭ konsolajn kaj kuraĝigajn vortojn. Unue ni konvikiĝu pri Dia amo. Dio volas ke ĉiuj homoj konvertiĝu kaj havu eternan vivon .Do ni ne timu! Restu trankvila kaj kredu je Dio kaj Kristo. Kristo estas nia bona Paŝtisto, kiu ne lasas eĉ unu ŝafon perdiĝi. Kristo estas la vera Reĝo de la mondo. Per sia Sankta Spirito gvidas nin kaj gardas nin. Ne lasu vin malcertiĝi en la vero. Serĉu la veron de la kredo. Kiam estas suferado kaj danĝero ni PREĜU. Jesuo promesis, ke Li estos kun ni ĝis la fino de la mondo. Ne lasas nin sola batali kontraŭ malbono. Jes ankaŭ por kredantoj venos malbonaj tempoj kaj sur la tero estos granda suferado sed jam en la ĉielo estas triumfo. Por ni fideluloj estas granda konsolo ke Dio lasas tempon por persekuto por malbono sed la tempo estas limigita. Ĝi havas mezuron.

Nia Savanto je la fino venkos la malbonaj potencojn kaj la morton. Jesuo revenos kaj la fina juĝo por fideluloj estos fina triumfo. Dio montris sian potencon, Kristo venkis kaj releviĝis. La malbona potenco nun estas pli forta, sed ne havas estontecon kaj falos. Jesuo diras konvertiĝu rapide, ĉar mi rapide revenos kaj juĝos ĉiujn homojn laŭ siaj faroj.

Do TIMU DION KAJ FIDU KRISTON, ĉar la venkantoj ricevas eternan vivon!

# Kuraĝo fronte al ISIS

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

**Leana, Kuraĝa Virino el Sirio**

Ni ĉiuj scias el la novaĵoj ke ISIS (Islama Ŝtato en Irako kaj Sirio) batalas kaj faras multajn kruelegaĵojn en la Meza Oriento; estas raportoj pri senkapigadoj kaj krucumadoj faritaj de ili. (Tiel ili sekvas la fiekzemplon de sia profeto Mahomedo kiu senkapigis 600 homojn samtempe.) ISIS donis ultimaton al la kristanoj el kelkaj urbegoj kiujn ili venkis: konvertiĝi al Islamo, pagi ekscesan imposton, foriri, aŭ morti. La intenco de ISIS estas forigi la kristanojn el tiu regiono.

Mi ĉerpas ĉi tiun informon pri Leana el la revuo 'Voĉo de la Martiroj' el la eldono de novembro 2014. Leana estas kristanino el Sirio. Ŝi preĝis ke Dio gvidu ŝin por proklami la Evangelion de Jesuo Kristo al la islamanoj el sia lando. Ŝi diris al la Sinjoro ke ŝi volas riski sian propran vivon; ŝi komprenas ke ŝia decido povus kosti la vivon de sia edzo.



Rifuĝantoj kaj helpantoj, Mt Sinjar. (ZiaLater)

Sed Leana sciis ke Dio ankaŭ montris al ŝi ke ankaŭ ŝiaj gefiloj povus esti mortigitaj. Ŝi batalis kun tiu ebleco, kiel farus iu ajn patrino. Sed per ŝia forta fido, ŝi faris ĉi tiun mirindan decidon: "La plejmulto da la [kristanaj] gepatroj maltrankviliĝas pro siaj gefiloj. Eĉ se ili ne estus nun per la bombadoj aŭ per armiloj mortigataj, ili maltrankviliĝas kiel ili vivos kune kun la islamanoj en la estonteco, ... tial, ni maltrankviliĝas pri la estonteco de la gefiloj. ... Sed samtempe, ni fidas je Dio. Li ĉiam regas, eĉ dum la sangoverŝado, dum la mortigado. Ni fidas ke Li vidas ĉion kaj ke Li scias pri la estonteco, kaj Li portas nian estontecon."

Leana kaj ŝia edzo decidis paroli kun siaj gefiloj. Ili diris al ili ke iun tagon viroj kun barboj povus perforte eniri en la familian domon kaj postuli ke ili konvertiĝu al la Islama Religio. La gepatroj diris al la gefiloj ke ili ne devas malkonfesi Kriston. Ili diris al la gefiloj ke eble ili sentos iom da doloro kaj ili vidos iom da sango, sed baldaŭ ili estos ĉe Jesuo.

Post tiu konversacio, fanatikuloj perforte eniris en la apartamenton dume la familio estis for kaj ili skribaĉis tre klaran mesaĝon sur spegulon: "Ni venis por buĉi vin."

Kial Leana volas vivi kun siaj familianoj fronte al tia danĝero? Tial ŝi kaj ŝia edzo, kiel ĉiu vera kristano, havas

vivan certecon ke je la momento de la morto ili TUJ iros al la ĉeesto de Jesuo Kristo. Kaj post la morto, venos la glora tago de la releviĝo.

Multajn jarcentojn antaŭ ol naskiĝis Jesuo Kristo, la pia viro Ijob skribis: "*Sed mi scias ke mia Liberigonto vivas, kaj fine Li leviĝos super la polvo. Kaj post kiam mia haŭto estos tiel detruita kaj mi estos senkorpa, mi vidos Dion.*" (Ijob 19, 25-26)

Inspirita de la Spirito de Dio, la apostolo Paŭlo skribas: "*Ni do ĉiam ĝoje kuraĝas, kaj ni scias, ke dum ni estas en la korpo, ni forestas de la Sinjoro (ĉar ni iradas fide, ne vide); ni ĝoje kuraĝas, kaj ni plivolas foresti de la korpo kaj ĉeesti kun la Sinjoro.*" (2-a Korintanoj 5, 6-8)

Jesuo diris: "*Mi estas la releviĝo kaj la vivo; kiu kredas al mi, eĉ se li estos mortinta, tiu vivos.*" (St Johano 11, 25)

La Apostolo Paŭlo skribas al ĉiuj veraj kristanoj en 1-a Korintanoj 15, 50-57:

*Kaj la jenon mi diras, fratoj, ke karno kaj sango ne povas heredi la regnon de Dio; kaj putreco ne heredas senputrecon. Jen mi sciigas al vi misteron: Ni ne ĉiuj dormos, sed ni ĉiuj ŝanĝiĝos, en momento, en okula ekmovo, ĉe la lasta trompetsono: ĉar la trompeto sonos, kaj la mortintoj releviĝos senputraj, kaj ni ŝanĝiĝos.*

*Ĉar estas necese, ke ĉi tiu putrema surmetu senputrecon, kaj ke ĉi tiu mortema surmetu senmortecon.*

*Sed kiam ĉi tiu putrema surmetos senputrecon, kaj ĉi tiu mortema surmetos senmortecon, tiam plenumiĝos la skribita diro: la morto forglutiĝis en venko. Ho morto, kie estas via venko? Ho morto, kie estas via pikilo? La pikilo de la morto estas la peko; kaj la forto de la peko estas la leĝo; sed danko estu al Dio, kiu donas al ni la venkon per nia Sinjoro Jesuo Kristo.*

Pro la certeco kiun la Apostolo Paŭlo havis pri la releviĝo, li eĉ mokas la morton: "Ho morto, kie estas via venko? Ho morto, kie estas via pikilo?"

*Kaj la jenon mi diras, fratoj, ke karno kaj sango ne povas heredi la regnon de Dio;*

**ISIS Ne Malŝaltis la Sonon**

Neniu el ni povas forgesi la 21 egiptajn, koptajn kristanojn kiuj estis sovaĝe senkapigitaj de ISIS sur marbordo de Libio antaŭ malmultaj monatoj. Neniu el la viroj malkonfesis Kriston.

Inter la 21 kristanaj martiroj estis du fratoj. Kiam iliaj ekzekutistoj postulis ke ili malkonfesu Kriston, ili laŭte proklamis ke ili NENIAM malkonfesus sian Sinjoron kaj Savanton! ISIS faris televidan bildon de la kruelegaĵo kiun ĝi metis sur la interreton.

Mi antaŭe skribis pri SAT-7, organizaĵo kiu dissendas evangeliajn programojn per satelito trans Nordan Afrikon, la Mezan Orienton, kaj trans Turkujon kaj Irakon. (La programoj estas dissendataj en la araba, turka, kaj irana lingvoj.)

Dum viva programo, viro telefonis al SAT-7 pri la televida bildo de ISIS. Li estis la frato de tiuj du fratoj. Jen resumo de la tradukaĵo de la konversacio kiu estis dissendita trans la tutan Mezan Orienton, Nordan Afrikon, kaj eĉ Eŭropon.

Telefonanto: "Ne estis nur unu frato [kiun mi perdis] . . . Mi havis du! Biŝoj, 25, kaj Samuelo, 23. Mi havas fierecon pro ili. Ili estas la fiereco de la krist-anismo.... Ili faris min piediri kun kapo alte levata."

Gastiganto: "Granda estas via fido."

Telefonanto: "ISIS donis al ni pli ol ni povus peti ĉar ili ne eliminis la parton kie ili [la du fratoj] proklamis sian fidon kaj vokis al Jesuo Kristo ... Mi dankas ISIS-on ... ISIS HELPIS NIN FORTIGI NIAN FIDON. JES ... KREDU MIN! ... Ĉi tio nur helpas nin elteni tiajn krizojn ĉar la Biblio instruas nin ke ni devas ami niajn malamikojn kaj beni tiujn kiuj malbenas nin."

Tiu tria frato, kiu nomiĝas Beŝir, tiam rakontis al la gastiganto de SAT-7 pri parolo kun sia patrino, demandante ŝin kion ŝi farus se ŝi renkontus unu el la mortigistoj sur la strato. Malgraŭ la mirego de ĉiuj, ŝi diris: "*... mi invitus lin hejmen ĉar li helpis ilin [ŝiajn filojn] eniri en la regnon de la ĉielo. Mi petus Dion ke li malfermu liajn okulojn.*" Tiam Beŝir preĝis dum la programo, petante ke Dio vere malfermu la okulojn de la mortigistoj el ISIS; ke ili turniĝu for el la mensogoj al la Vero. Ĉiuj en la sidejo de SAT-7 emociiĝis kiel ankaŭ dek miloj da aliaj homoj kiuj vidis ĉi tiun programon de SAT-7.

La Biblio parolas tre klare pri tiuj kiuj estas senkapigitaj pro sia fido je Jesuo Kristo: "*Kaj mi vidis tronojn, kaj oni sidis sur ili, kaj juĝo estas donita al ili; kaj mi vidis la animojn de la* senkapigitaj *pro la atesto de Jesuo kaj pro la vorto de Dio, . . . kaj ili viv[o]s kaj ili reĝ[o]s kun Kristo mil jarojn.*" (Apokalipso 20, 4)

*Ĉiu el ni devas certiĝi ke Jesuo Kristo estas nia Savanto.*

Ne gravas ke tiuj fideluloj estis sen-kapigitaj; ili ricevos novajn, senmortajn korpojn. Oni povas posedi milionon da dolaroj aŭ eŭroj, sed se li ne fidas je Jesuo Kristo kiel sia Savanto, se li ne posedas certecon pri la releviĝo, *li havas nenion*!

Ĉiu el ni devas certiĝi ke Jesuo Kristo estas nia Savanto. Ĉiu el ni devas certiĝi ke je la momento de la morto ni tuj iros al la ĉeesto de la Sinjoro, kaj ke poste ni ricevos senmortan korpon alvenonte la Glora Tago de la Releviĝo.

Glorata estu Jesuo!

# Alvenis letero/bulteno




Karaj Legantoj, tiu ĉi bulteno estas iom pli vasta, ĉar entenas la sensacian artikolon pri Esperanto en nazia koncentrejo. En ĝi troviĝas tiom da nekonataj faktoj, ke ne eblis ilin priskribi nur unupaĝe. Ni publikigas tion, ĉar en majo oni celebras 70an datrevenon ekde kiam sur eŭropa kontinento finiĝis la 2a mondmilito. Tio estis la plej granda kaj terura tragedio en tuta historio de la homaro kaj inter la jaroj 1939-1945 pli ol 70 milionoj da homoj pereis.

Antaŭ 100 jaroj, la 12an de majo 1915 naskiĝis frato Roger Schutz, fondinto de la Taizé-komunumo (orienta Francujo, proksime al Svislando) kie, ekde jardekoj, renkontiĝas amase junularo el multaj landoj. Vi povas legi pri tio ankaŭ en Esperanto, uzante la vikipedian retejon: http://eo.wikipedia.org/wiki/Taizé. Por ni estas eble interesa la informo, ke al Taizé veturis ankaŭ junaj esperanatistoj kiuj klopodis ke, inter la kelkdeko da lingvoj, ankaŭ Esperanto estu tie uzata. En nia Internacia Lingvo aperis eĉ la t.n. "Letero de Taizé" sed hodiaŭ oni plue uzas tie nur naciajn lingvojn. Homoj veturantaj al Taizé estas tre impresitaj de amikeca atmosfero, samkiel de bela muziko kaj kantoj en diversaj lingvoj. La interesatoj povas ĝin aŭdi uzante la popularan "Youtube".

Tia estas la "franca akcento" en nia kuranta numero, ĉar baldaŭ okazos la jubilea Universala E-kongreso en Lille (Francujo) – verŝajne tre sukcesa ĉar partoprenos ĝin multaj esperantistoj.

Amikajn salutojn al ĉiuj – "NU".

hamilton

**"NOVA URBO"**

estas esperantlingva novaĵletero de la Fokolar-Movado, kiu estas kristana ekumena movado. Ĝi estis fondita 1943 de Chiara LUBICH en Trento dum la dua mondmilito. Origine la movado estiĝis ene de la Rom-katolika eklezio sed nuntempe ĝi troviĝas ankaŭ ekster la Rom-katolika eklezio en pli ol 180 landoj kun pli ol 100 mil membroj kaj 2 milionoj da apogantoj. La movado okupas sin prcipe pri socia laboro kaj volas plibonigi la rilatojn inter homoj kaj eklezioj. Karakterize la movado estas laika sed multaj pastroj kaj episkopoj estas inter la apogantoj.

[bazita sur Vikipedio]

# Antaŭ 100 jaroj

## La Armena Genocido

Plejparte bazita sur artikoloj el Vikipedio

Kiam la nuna papo Francisko en aprilo ĉi-jare dum meso priskribis la *Armenan Genocidon* esti la unua genocido en la 20a jc. li kreis diplomatan krizon kun Turkio. Turkio estis ŝokita sed Armenio bonvenigis la eldiron. Laŭ la papo li devis honori la memoron de senkulpaj viroj, virinoj kaj infanoj, kiujn otomanaj turkoj "sencele" murdis 100 jarojn antaŭ li iĝis pontifiko.

La armena genocido estis la perforta deportado dum la Unua Mondmilito kaj fina murdado de granda nombro da armenoj, kalkulitaj proksimume je pli ol unu miliono. Ĝi karakteriziĝis pro la brutaleco de la masakroj kaj la uzado de perfortaj marŝadoj je ekstremaj kondiĉoj.

La tradicia dato pri ĝia ekiĝo estas memorata la 24-an de aprilo 1915. Tiun saman tagon la otomanaj aŭtoritatoj arestis ĉirkaŭ 250 armenajn intelektulojn kiuj estis gvidantoj de la armena komunumo de Istanbulo. Poste la otomanaj militistoj forpelis la armenojn el iliaj hejmoj kaj devigis ilin marŝi centojn da kilometroj – laŭlonge de la dezerto de tio kio hodiaŭ estas Sirio – senigataj de nutraĵoj kaj akvo.

Kvankam la Respubliko Turkio ne neas ke la civilaj masakroj kontraŭ la armenoj vere ekzistis, ĝi ne agnoskas ke ĝi estis genocido, ĝi oficiale konsideras ke tiuj masakroj okazis pro la interetnaj bataloj, la malsanoj kaj la malsatego dum la konfuza periodo de la Unua Mondmilito. Malgraŭ tiu tezo, preskaŭ ĉiuj esploristoj – inkluzive de kelkaj turkoj – opinias ke la okazintaĵoj kongruas kun la nuna difino de la vorto genocido. Ĝi estas ĝenerale konsiderata kiel la unua moderna genocido; fakte, ĝi estas la plej studata post la Holokaŭsto.

---

**Cicernakaberd** aŭ **Tzicernakaberd** estas monumento starigita memore al la viktimoj de la genocido. Ĝi estis konstruata sur monteto, okcidente de la rivero Hrazdan kaj proksime de la urbo Erevano, la ĉefurbo de Armenio.

**La steleo**: Monumento je 44 metroj kiu celumante ĉielen, signifas *la renaskiĝon de la armenoj*. **La dek du slaboj,** el griza bazalto, reprezentas la 12 provincojn perditajn en la nuna teritorio de Turkio. Ene de ili troviĝas la eterna flamo, funebrosimbolo. **La murego,** je 100 metroj, havas la nomojn de la urboj kaj vilaĝoj armenaj en kiuj okazis la masakroj.



# Antaŭ 70 jaroj

## Bonhoeffer estis murdita

Plejparte bazita sur prelegoj de Siegfried KRÜGER, DE

Bonhoeffer estis protestanta teologo kaj martiro. Li naskiĝis en Vroclavo, tiama Breslaŭ, en 1906. Li estis ekzekutita en aprilo 1945 en la koncentrejo Flossenbürg pro sia partopreno en komploto kontraŭ Hitler.

Bonhoeffer kiel ekumena martiro estas trovebla en la ikono de la kristanaj martiroj de la 20-a jc. en la basiliko San Bartolomeo en Romo.

Postsekvo de Jesuo estis la gvidtemo de lia kredo, vivo kaj teologia instruo. La kredo instigis lin seninterrompe agi por paco kaj justeco cele al vivanta atestado de la Evangelio.

La vivo de Bonhoeffer estis portita de sendetruebla espero, eĉ survoje al la ekzekutisto. De Bonhoeffer ni povas lerni, kiel unuopulo povas esperigi la mondon.

La verko de Bonhoeffer same kiel lia ĉesigita vivo restis fragmento. Tamen li fariĝis unu el la grandaj instigantoj de la postmilita teologio kaj li ankaŭ ludas rolon en la liberigaj eklezioj kaj movadoj en suda Afriko, Brazilo kaj Meza Ameriko. Kaŭzo nelaste estas la fascina ligo inter vivo kaj penso. En lia vivo plastikiĝas lia penso, kaj en lia penso trabrilas signifo, kiu postvivas la aktualan historion. Baza penso de li estas la senkondiĉa sekvado de Jesuo Kristo kaj vivo laŭ la montprediko.



Bonhoeffer estis eklezikritika; spiritan parencecon li havas ekz. kun Francisko el Assisi, Martin Luther kaj kun la frataro de Taize.

ଓ

**Sub ŝirm' mirinda de potencoj bonaj**

Sub ŝirm' mirinda de potencoj bonaj
l'estonton kun trankvil' atendas ni.
Apudas Di' vespere kaj matene,
kaj ĉiun novan tagon sendas Li.

Se temp' antaŭa plu turmenton donas,
se tag' malbona premas per angor',
la savon donu, kiun Vi proponas,
ho Di', por nia terurita kor'.

Kaj se kalikon donas Vi amaran,
sufero-plenan, pezan ĝis ekstrem',
ni prenas ĝin el Via man' amata
dankeme, fidoplene kaj sen trem'.

Se tamen Vi ankoraŭ donos ĝojon
pri tiu mond' kaj ĝia brila sun',
ni rememoros la iritan vojon;
nur Via estu nia vivo nun.

Ho, ke per Vi ekbrulu la kandeloj
kun milda, varma lum' en sombra mond'!
Nin kunen duku* Vi, laŭ Viaj celoj,
ĉar estas Via lum' al ni respond'.

Dum ĉiu tera bruo iĝas febla,
por ni laŭtiĝu tiu plen-sonor'
el Via vasta mondo nevidebla,
akordoj ravaj de l'eterna ĥor'.

* *devenante de* duko, *tiu kiu mezepoke antaŭen iris* *la siajn*.
*(Traduko:* Adolf Burkhardt*, 1977, 2001 en* ADORU *n. 490; 5-a strofo:* Karl Heinz Schaeffer*, 2007 kaj – en* Kloster Kirchberg – Albrecht Kronenberger*, 2007. La germana originalo havas 7 strofojn.)*

# Antaŭ 700 jaroj

## Jan Hus estis murdita

Plejparte bazita sur Vikipedio



Jan Hus sur la ŝtiparo - iluminaĵo de Janíček Zmilelý el Písek

Magistro Jan HUS, naskiĝis ĉirkaŭ 1371, mortis la 6-an de julio 1415. Li estis ĉeĥa romkatolika pastro, mezepoka religia pensulo, reformisto kaj predikisto, antaŭulo de Martin Luther; majstro kaj rektoro (1409-1410) de Praga universitato.

En la ĉeĥan literaturon Hus enskribiĝis per pluraj teologiaj verkoj latinlingvaj kaj ĉeĥlingvaj kaj per reformo de la ĉeĥa ortografio (supersignoj). Hus krome estis tradukinto de la Trilogus de John Wycliffe, kiu influis lian penson.

La aresto de Jan Hus en Konstanco dum la jaro 1414 elvokis en la ĉeĥaj landoj grandan streĉon kaj la nobelaro postulis ke imperiestro Zigmundo la 1-a liberigu Jan Hus. Post la morto de Hus komenciĝis malfermaj bataloj, precipe kontraŭ katolikaj klerikoj kaj ordenanoj, kaj la ĉefepiskopo de Prago devis fuĝi. Reĝo Karolo la 4-a, gvidata ankaŭ de sia malamo kontraŭ Zigmundo la 1-a, favora al la Husanoj, subtenis la ribelon.

En la jaro 1419 en Bohemio eksplodis la plej diversaj kunfliktoj. En la jaro 1420 la husanoj fiksis sian programon en la t.n. Kvar artikoloj pragaj. En la sama jaro ili fondis urbon Tábor, kiu poste fariĝis la centro de la husana revolucio.

La Hus-movado aŭ husana revolucio, kiu baziĝis sur predikoj de Magistro Jan Hus, estis radikala kristana reforma movado inter la jaroj 1415 ĝis 1436 en Ĉeĥio, rande ankaŭ en Slovakio kaj Saksio. La movado postulis longefikan reformon de la kristana eklezio.

—

De Jan Hus, en Esperanton el la latina, tradukis Gerrit Berveling DEFENDO DE LA LIBRO PRI LA TRIUNUO.



Jan Hus

# Antaŭ 10 jaroj

## Roger Schutz estis murdita

Plejparte bazita sur Vikipedio

Frato Roger Schutz estis filo de svisa pastoro. Li naskiĝis en 1915 kaj estis murdita dum komuna preĝo la 16-an de aŭgusto 2005 en Taizé, Francio. Roger Schutz estis la fondinto de la Taizé-Komunumo. Tiu kristana kunularo estas fama pri sia muziko kaj liturgia stilo.

Inter la jaroj 1937-1940 li studis kalvinan teologion en Strasbourg kaj Lausanne. En 1940 li sentis sin pelita por “konstrui komunan vivon, en kiu la repaciĝo laŭ la Evangelio estus konkretaĵo vivata”. Tio okazis dum la dua mondmilito. Biciklinte al Taizé li aĉetis malplenan domon kaj kune kun sia fratino li helpis kaj kaŝis kristanajn kaj judajn fuĝantojn ĝis kiam Gestapo eklernis pri ilia agado. En 1944 li revenis al Taize kun kelkaj kunuloj el diversaj eklezioj.

Frato Roger diris pri si mem: “Mi malkovris mian kristanan identecon tra repacigo en mi mem de miaj evangeliaj devenoj kun la kredo de la Katolika Eklezio.”

Longtempe antaŭ la malkonstruo de la Berlina Muro, la fratoj de Taizé iris diskrete en la landojn de la Orienta Eŭropo por renkonti junulojn. Tiel estiĝis privilegia kontakto de Taizé kun la Orienta Eŭropo.



Frato Roger dum preĝo, 2003

TAIZÉ

Jaron post jaro, la Komunumo de Taizé disvolviĝis: kunuloj tiel alvenis al Frato Roger, ke ĝi nuntempe konsistas el fratoj el trideko de nacioj, kiuj estas ĉu katolikoj, ĉu el diversaj evangeliaj devenoj, ĉu ortodoksoj.

La komunumo akceptas neniun donacon por si mem. La fratoj perlaboras sian vivon. La individuaj heredaĵoj estas transdonataj al la senprovizituloj.

La Letero de Taizé aperas ĉiu-jare en multaj lingvoj. En 1996 ĝi aperis ankaŭ en Esperanto.

# La mondo burĝonanta, somero

## Kvara parabolo el LA PAŜTISTO

el la Greka tradukis Gerrit BERVELING, NL

La tria parabolo estis publikigita en DR 1/2015. La verkaĵo LA PAŜTISTO de la frukristana profeto Hermas, estis verkita en la tempo inter 100 kaj 150 p.Kr.; oni asertas, ke li estis frato de Pio la 1-a, la episkopo de Romo (145-155).

## Kvara parabolo

**1[53]**:1 Li montris al mi multajn aliajn arbojn, kelkaj burĝonis, aliaj elsekiĝis, kaj li diris al mi:

Ĉu vi vidas – li diris – tiujn arbojn?

Tiujn, sinjoro – mi diris – mi vidas, kaj kelkaj estas verdaj, aliaj sekaj.

2 Tiuj verdaj arboj – li diris – reprezentas la homojn, kiuj loĝos en la venonta mondo; ĉar la venonta mondo estas la somero por la justuloj, sed por la pekuloj vintro. Kiam do ekbrilos la kompato de la Sinjoro, tiam klare aperos tiuj, kiuj estas sklavoj de Dio, ja ĉiuj klare videblos.

3 Ĉar kiel en la somero videbliĝas la fruktoj de ĉiu unuopa arbo, kaj estas konstatite, kiaj ili estas, tiel same la fruktoj de la justuloj estos klare videblaj, kaj koniĝos ĉiuj, kiuj bone fruktas en tiu mondo.

4 Sed la paganoj kaj la pekuloj, kiujn vi vidis kiel sekajn arbojn, montriĝos sekaj kaj senfruktaj en tiu mondo, kaj kiel lignaĵo ili estos forbruligitaj kaj ili estos klaraj, ĉar ilia agado montriĝis malbona en ilia vivo. Kaj la pekuloj estos bruligitaj, ĉar ili pekis kaj ne pentis; la paganoj estos bruligitaj, ĉar sian Kreinton ili ne rekonis.

5 Viaflanke do vi estu fruktodona, por ke en la somero koniĝu la frukto. Retenu vin tamen de la multa agado, kaj atentu ke neniam vi peku. Ĉar kiuj multe agadas, ankaŭ multe pekas kaj distritaj per sia agado, ili neniel estas plu sklavoj de Dio.

6 Kiel ja – li diris al mi – tia homo povas peti ion de la Sinjoro kaj ricevi ĝin, se li ne estas sklavo de Dio? Ĉar kiuj estas sklavoj al Li, tiuj ricevos kion ili petis. Sed kiuj ne estas sklavoj al la Sinjoro, tiuj ne ricevos.

7 Sed se iu faras nur unu agon, li ankaŭ povas esti sklavo al la Sinjoro. Ĉar lia menso ne koruptiĝas for de la Sinjoro, sed li estos sklavo al Li, ĉar menson puran li havas.

8 Se tion vi do faros, vi povos esti fruktodona por la venonta mondo; kaj kiu tion faras, tiu estos fruktodona.

# Tagordo por la jarkunveno de KELI 2015

1 Malfermo
2 Elekto de kunprotokolantoj
3 Akcepto de la tagordo
4 Komunikoj
5 Funebra memorigo
6 Sekretaria jarraporto
7 Kasista jarraporto
8 Raporto de la kaskontrolantoj
9 Diskuto kaj akcepto de la raportoj
10 Buĝetoj
11 Raporto de la redaktoro
12 Estrarelekto
13 Kongresplanoj
14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
15 Fermo

**Klarigoj:**

*(12) Ĉi-jare finiĝas la 3-jara deĵorperiodo de Bengt Olof Åradsson kaj Zoltán Somhegyi. Ambaŭ estas reelekteblaj.*

*(13) Propono ke la KELI-kongreso 2016 okazu en Bratislava (Slovakio)*

---

## Bratislavo [ĉerpoj el Vikipedio]



En Bratislavo troviĝas registaro, parlamento, diversaj oficejoj kaj ministerioj. Bratislavo estas urbo riĉa je memorigaĵoj, el kiuj multaj troviĝas en Malnova Urbo. Dominaĵo estas kvarangula Bratislava burgo, apud kiu troviĝas konstruaĵo de Nacia Asembleo de Slovakio kaj proksime Katedralo Marteno de Tours. La plej konata placo en Bratislavo estas Ĉefa placo, troviĝanta en la urbocentro. Lastfoje ĝi estis rekonstruita en la jaro 2005, kiam estis komplete ŝanĝita pavimo. Proksime troviĝas ankaŭ Primaciala placo kaj Placo de Hviezdoslav. Ŝtona placo, troviĝanta meze de Malnova urbo, estas preparita por la tuta rekonstruo. Bratislavo estas la unusola ĉefurbo en la mondo, kiu limas samtempe kun du landoj. Ekde 2008 la 3 landoj apartenas al interna zono de Schengen, sekve la limoj estas ie ajn senkontrole trapaseblaj. Antaŭ la dua mondmilito oni parolis en Bratislava per tri lingvoj: germane, hungare kaj slovake. ☙

# Financa raporto de KELI 2014 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | | Bilancoj fine de la jaroj 2013 | |
|---|---|---|---|
| **Aktivoj** | | | |
| | Stokoj de libroj | 4.925,03 | 4.925,03 |
| | Stoko de kasedoj, E-Misio | 116,00 | 116,00 |
| | *Provizo* | *5.041,03* | *5.041,03* |
| | Postuloj – LKK de Strasburgo | | 6.013,00 |
| | Postuloj (IKUE, profito el kongreso) | | 1.342,00 |
| | Kasista kaso | 0,00 | 20,00 |
| | Sekretaria kaso | 2.520,00 | 828,00 |
| | UEA-konto kelk-p | 10.020,74 | 8.659,72 |
| | Ĝir-konto, CIC-banko | 763,98 | 609,55 |
| | Ŝpar-konto, CIC -banko | 31.866,54 | 26.308,32 |
| | *Monrimedoj* | *45.171,26* | *43.780,59* |
| | **Sumo de aktivoj** | **50.212,29** | **48.821,62** |
| **Pasivoj** | Kapitalo | 20.246,27 | 21.510,12 |
| | Rezulto de la jaro | **1.263,85** | **963,21** |
| | *Kapitalo entute* | *21.510,12* | *22.473,33* |
| | Dumvivaj membroj | 2.094,88 | 2.358,50 |
| | E-Misio | 6.894,51 | 6.894,51 |
| | Helpa kaso | 3.340,48 | 1.550,48 |
| | Kongresa rezerva kaso | 1.823,48 | 1.823,48 |
| | Literatura/Himnara kaso | 12.941,57 | 12.941,57 |
| | *Fondusoj entute* | *27.094,92* | *25.568,54* |
| | Kreditoroj (finna kaj brita kaso) | 345,25 | 0,00 |
| | Evidente | 1.262,00 | 717,25 |
| | KELI-abonoj de EK | | 12,50 |
| | Kongresaj kotizoj | 0,00 | 50,00 |
| | *Transitaĵoj kaj pasivoj* | *1.607,25* | *779,75* |
| | **Sumo de pasivoj** | **50.212,29** | **48.821,62** |

# Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2013-12-31

## Aktivoj

### Stokoj

En la jaro 2014 ne ŝanĝiĝis la Stokoj de libroj aŭ kasedoj. Estus bone malgrandigi nian stokon kaj eble sendi librojn kaj kasedojn al malriĉaj landoj aŭ al tiuj landoj, kie la kristanoj vivas minoritate.

### Postuloj

Por la rezervo de la dormloko dum la kongreso, LKK devis antaŭpagi. Tiu sumo post la alveno de la kongreskotizoj estos repagita. La kongreso en Trento 2014 havis profiton, kiun IKUE kaj KELI dividis laŭ la nombroj de la partoprenintoj de la du organizoj. Tiun ĉi sumon LKK de Trento IKUE tranferos al KELI.

### Monrimedoj

Kasista kaso estas ĉe Ágnes Ráczkevy-Eötvös (HU), kutime kun malalta sumo. Sekretaria kaso estas ĉe Pavel Polnický (CZ), kiu zorgas pri la presado kaj dissendado de Dia Regno. KELI havas bankkontojn ĉe la franca CIC-banko kaj ĉe UEA (kelk-p).

## Pasivoj

### Kapitalo

Kapitalo enhavas la sumigitan rezulton de la antaŭaj jaroj. La rezulto de la jaro 2014 estis 963,21 eŭroj.

### Fondusoj

Laŭ la decido de la estraro Dumvivaj membroj, E-Misio, Helpa kaso, Kongresa rezerva kaso kaj Literatura/Himnara kaso estas aparte montritaj. En 2014 grava ŝanĝo okazis nur je la Helpa kaso, kiu estas por helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson.

### Transitaĵoj kaj pasivoj

Kreditoroj estis pasintjare la finna (erara transfero) kaj la brita (nedecidita sumo) sekcioj de KELI. Tiuj sumoj estis aranĝataj. Ankaŭ en 2014 KELI-anoj kolektis monon al la fonduso Stichting Zienderogen (antaŭa Evidente). La sumo jam estas transkontigita al la fonduso Zienderogen. Same la alveninta abono de Espero Katolika jam estas transkontigita al IKUE. La kongresaj kotizoj estas la antaŭpagitaj aliĝ-kotizoj aŭ kongres-kotizoj, kiu alvenas rekte al la bankkonto de KELI kaj estas transferitaj al LKK.

## Rezulto 2014 kaj buĝetoj 2014, 2015 kaj 2016 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | Buĝeto 2014 | Rezulto 2014 | Buĝeto 2015 | Buĝeto 2016 |
|---|---|---|---|---|
| **Enspezoj** | | | | |
| Kotizoj/Abonoj | 2.200 | 2.414,78 | 2.400 | 2.400 |
| Kotiz- kaj kursdiferencoj | 0 | 0 | 0 | 0 |
| Adopta Kaso | 1.000 | 149,08 | 600 | 600 |
| *Kotizoj entute* | *3.200* | *2.563,86* | *3.000* | *3.000* |
| Librovendado | 100 | 20,00 | 100 | 50 |
| Rentumoj | 600 | 441,78 | 450 | 400 |
| Profito el kongreso | 200 | 1.342,00 | 200 | 200 |
| *Aliaj enspezoj* | *900* | *1.803,78* | *750* | *650* |
| **Enspezoj entute** | **4.100** | **4.367,64** | **3.750** | **3.650** |
| **Elspezoj** | | | | |
| Presisto kaj sendado de DR | 2.700 | 2.642,00 | 2.650 | 2.600 |
| Perantoj | 10 | 0,00 | 0 | 0 |
| *Revuokostoj* | *2.710* | *2.642,00* | *2.650* | *2.600* |
| Prezidanto | 20 | 20,00 | 20 | 20 |
| Sekretario | 70 | 70 | 70 | 70 |
| Redaktoro | 250 | 250,00 | 250 | 250 |
| Kasisto/Matrikulisto | 20 | 20,00 | 20 | 20 |
| *Estrarkostoj* | *360* | *360* | *360* | *360* |
| UEA-kotizo | 60 | 63,00 | 60 | 65 |
| Kaskontrolo | 0 | 0 | 0 | 0 |
| Bankkostoj | 290 | 237,43 | 250 | 250 |
| Merituloj | 40 | 52,00 | 50 | 50 |
| UK Lukostoj | 70 | 50,00 | 50 | 50 |
| *Ĝeneralaj kostoj* | *460* | *402,43* | *410* | *415* |
| Librovendado (kostoj) | 20 | 0,00 | 20 | 10 |
| Varbado (Inf./varba kaso) | 20 | 0,00 | 20 | 10 |
| Rabatoj de Perantoj | 10 | 0,00 | 10 | 5 |
| *Aliaj elspezoj* | *50* | *0,00* | *50* | *25* |
| **Elspezoj entute** | **3.580** | **3.404,43** | **3.470** | **3.400** |
| **Saldoj** | **520** | **963,21** | **280** | **250** |

# Klarigoj kaj rimarkoj pri la Rezulto 2013 kaj la Buĝetoj 2014/2015

## Enspezoj

### Kotizoj

La Kotizoj en 2014 estis iom pli ol planitaj, sed bedaŭrinde al la Adopta kaso alvenis multe pli malmultaj mondonacoj ol kutime. La Adopta kaso estas mondonacoj de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Ili estas petataj kontribui "laŭforte". Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj. En 2013 enfluis 1.241,28 eŭroj, sed en 2014 nur 149,08 eŭroj.

### Aliaj enspezoj

Minimala librovendado okazis en la jaro. La sumo de Rentumoj estis pli malmulte ol ni planis. La profito el kongreso en Trento estas dividita inter IKUE kaj KELI laŭ la nombroj de la partoprenintoj de la du organizoj.

## Elspezoj

### Revukostoj

La kosto de Dia Regno enhavas kaj la presadon kaj la dissendadon.

### Estrarkostoj

En 2014 la kostoj estis la planitaj sumoj.

### Ĝeneralaj kostoj

En tiu ĉi kategorio apud la UEA-kotizoj kaj Bankkostoj estas la donacoj, kiujn ni donis al la LKK-anoj de la kongreso en Trento, kaj ni pagis al UEA la lukoston dum la Universala Kongreso en Bonaero.

### Aliaj elspezoj

En la jaro 2014 KELI ne pagis aliajn elspezojn.

## Saldoj

La saldo de la jaro 2014 estis 963,21 eŭroj. La malaltiĝon de la sumo de Adopta kaso povis anstataŭigi la Profito el la kongreso, tamen ŝajnis logike pli singarde fari la buĝetojn al la sekvontaj jaroj. La financa bazo de KELI daŭre estas kontentiga.

## Buĝetoj

La Buĝetoj de la jaroj 2015 kaj 2016 estas en la Enspezoj planitaj optimiste, kredante ke la membraro de KELI daŭre subtenos nian Ligon kaj niajn membrojn, kiuj vivas inter pli malbonaj vivcirkumstancoj. Niaj kostoj malaltiĝis pro la reduktado de ekzempleroj eldonitaj de Dia Regno kaj ankaŭ pro tio, ke la kaskontroloj okazas dum la kongreso, antaŭ la jarkunveno

# Informetoj

## Letero

Pro libropakaĵo kun Adoru, Biblioj kaj preĝlibretoj, kiun ni sendis al Kubo, la prezidanto ricevis la suban dankleteron.

*Estimata amiko Philippe*

*Dio benu vin!*
*Senkulpigu min pro mia longa silento. Mi petas pardonon, ĉar la komputilo de mia amiko Cabrera estis rompita kaj mi devis piediri malproksime de mia domo por skribi al vi. Mi esperas, ke vi povas kompreni mian situacion, do mi ne havas komputilon kaj mi devas labori tre forte por aĉeti ĝin.*
*DANKON pri la pakaĵo, kiun vi donacis por la kristana klubo en mia urbo.*
*Ili sendas al vi brakumojn kaj bonan sukceson, por vi kaj via familio.*

*Brakumojn por vi, via familio kaj la granda kristana familio, kiu ni estas en KELI.*

*Elkore salutas Danielo en la servo de Dio.*

---

## Reagoj

La pasinta numero kauzis kelkajn legantojn diskuti inter si kaj kun la redaktoro pri la enhavo de la artikolo *Liberigo per la nomo de Jesuo.* Montriĝis ke ne ĉiuj samopiniis kun la aŭtoro pri la temo kaj ankaŭ leviĝis la demando ĉu estis taŭga artikolo por Dia Regno.

Kiel redaktoro mi ĝojas ke la publikigitaj artikoloj vekas reagojn ĉe la legantoj. Mi supozas ke ĝiaj aŭtoroj same opinias.

Estas tute nature, ke artikoloj, kiujn membroj verkas, ankaŭ respegulas la diversecon inter ni membroj kaj pro tio esprimas ideojn kaj flankojn de la kredo pri kiuj ne ĉiuj same kredas kaj opinias. Nia legantaro estas ege heterogena. Ni apartenas al diversaj konfesioj. Ni interpretas kaj komprenas la Biblion diversmaniere. Mi volas starigi la demandon – en tiu diverseco, kiu artikolo ne estas taŭga por publikigi?

Mi fine volas rimarkigi ke pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj kaj se vi ne samopinias, mi volonte publikigas vian reagon. Estu viva diskuto!

# Rememore pri
# Jenő Zágoni
## 1937 - 2015

Jenő Zágoni, kiu modeste kaj efike laboris por nia lingvo, mortis la 7-an de majo 2015. Li naskiĝis en 1937 en Transilvanio, vivis kaj laboris tie en la urbo Sfintu Gheorghe ĝis 1989. Tiam li ne plu povis elteni la politikan premon en la lando kaj fuĝis kun la edzino kaj du filoj al Hungario. En Budapeŝto li aĉetis pere de la kolektita sumo, kiun samideanoj disponigis al li, malgrandan apartamenton. Tie li vivis ĝis la morto en 2015. Jenő estis sincera kaj aktiva kristano, membro de KELI ĝis la transloĝiĝo en 1989, ĉar en la nova urbo li, komence senlabora, bezonis ĉiun moneron por vivteni sian familion.

Mi konatiĝis kun li en 1980, kiam mi aranĝis mian rondvojaĝon tra Transilvanio, por vidi ĉiujn lokojn, kie Andreo Cseh en sia junaĝo loĝis. Mi skribis al kelkaj Esperantistoj en tiu provinco por helpi min. Jenő tuj respondis, ke li estis profesia arĥivisto kaj jam dum jaroj kolektis leterojn de kaj al Cseh kaj pristudis lian agadon. Sekve neatendite mi havis kontakton kun Esperanta arĥivisto kaj eĉ pli kun csehologo. Dum gastama rendevuo en lia loĝejo mi legis plurajn leterojn, sed ne povis kunporti la skatolojn al Nederlando. Espereble tiun unikan materialon la filoj scipovas savi por Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Jenő Zágoni restas en mia memoro kiel tre simpatia kaj kapabla amiko.



Farita fine de junio 1980; de maldekstre Jenő Zágoni, edzino de Jenő, edzino de Ed, Ed Borsboom; la 2 knaboj estas filoj de Zagoni, el kiuj unu nomiĝas Zsolt.

*Ed Borsboom*

# Haleluja

ALELUJA




ALELUJA • el la meso Terra sem Males (Ter' sen malbono) • Textes pour la semaine de prière pour l'unité des chrétiens et pour toute l'année, p. 19 • portugala T: Don Pedro Casadáliga, Brazilo, kaj Pedro Tierra, Paragvajo • M: Martin Coplas • argentina © 2014 administrata de WCC-COE, P.O. Box 2100, CH-1211 Geneva 2 • angla © 2014 Terry MacArthur, Usono • E (traduko, aldono de dua alternativo): Albrecht Kronenberger 2015-01-07

Rimarko:
Ekster la spiriteco de Terra sem Males (Ter' sen malbono), baziĝanta i. a. sur mito de la indianaj gvaranioj ĉefe en Argentino kaj Paragvajo, oni prefere elektos la duan alternativon.